EKO

Esperiga Komuniko

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

*EKO 2020-56 sendita el Budapeŝto, la 7an de decembro*

## Enhavo


- **Zamenhofa Festo el historia loko**
- **Irana universitato kontribuas!**
- **Madagaskaro – oficialaj kursoj**
- **Krakovo – plia universitato**
- **Belartaj Konkursoj 2021**


Krakovo

Redakcio: Stefan MacGill, Mirejo Grosjean.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en multaj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Pli ol dumil kun plusendoj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

# Zamenhofa festo en Białystok – tutmonda

Ni instigas partopreni en Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj

https://eventaservo.org/e/bjalistoko2020

Tio okazos ekde la 11a ĝis 13a de decembro, en reta formo per la programo *Zoom*.

La partopreno estas senpaga. La programon kaj detalojn vi trovos ĉe la jena retpaĝo

https://espero.bialystok.pl/eo/bjalistokaj-zamenhof-tagoj-2020/

Laŭ plano sabate la 12-an de decembro matene je la 10:00 oni prezentos filmon pri la 32aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, la aranĝo de krakova esperantistaro. Tiu tago estos la ĉefa tago por internaciaj gastoj. La supra retejo informos pri la aliaj tagoj.



Foto: La vicurbestro de Bjalistoko Aleksander Sosna kaj Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof transprenas la kongresan flagon dum la UK 2008

En la 13a okazos reta ekskurso, ekde la 10:30 CET. Mi kiel dinosaŭro ja scias, kio estas ekskurso, eĉ partoprenis multajn, plejlaste januare en Nov-Zelando – kie ekskurso estas io ege serioza. Sed kio estas **reta** ekskurso?… nu, mi ne scias. La respondo: https://eventaservo.org/e/74cfb8

EKO eke dankas pro rapidegaj reagojde lokuloj por maturigi ĉi tiun informon. Partopren-emuloj anoncu vin al la lokuloj. Ĉiu anoncinto por AMO en 2020 ricevos alir-informojn.

Adam Wilkus/SMG

# Retseminario en la Universitato de Ŝirazo - trezorejo

Irano aktivas.Jen ligilaro al filmoj de la Retseminario en la Universitato de Ŝirazo:

**Unua tago de la Retseminario, la 23an de nov. 2020:**

1. Prof. Humphrey Tonkin: *La valoro de Esperanto en universitatoj*
https://www.youtube.com/watch?v=tCC7GqxBPno&t=1150s&pbjreload=101

2. Prof. Dennis Keefe: *Esperanto en Ĉinio*

https://www.youtube.com/watch?v=MlcKQJfxENQ&t=306s

3. Prof. Francesco Maurelli: *Junularo kaj Esperanto*

https://www.youtube.com/watch?v=KArA-wzsSz8&t=984s

**Dua tago de la Retseminario, la 25an de nov. 2020:**

1. Prof. Federico Gobbo: *La mesaĝo de Zamenhof hodiaŭ: Esperanto kaj ne nur*
2. Prof. Renato Corsetti: *Ĉiuj homoj naskiĝas egalaj*
3. Prof. Natalia Dankova: *Kiel Esperanto adaptiĝas al vi*

https://www.youtube.com/watch?v=T-F6eyXZ4-A



**Tria tago de la Retseminario, la 26an de nov. 2020:**

1. Prelego de prof. Gong Xiaofeng (Arko): *Kiel mi enkondukis Esperanton en la universitaton de Nanchang* (vidu la foton.)

2. Prelego de prof. Vincente Manzano-Arrondo (Viko): *Esperanto kiel universitata liberigilo*

3. Inĝ. Ahmad Reza Mamduhi: *Kion Esperanto donis al mi, kaj kion povas doni al la mondo*

https://www.youtube.com/watch?v=ZAUIEIgUu50

Ahmad Mamduhi

# Madagaskaro – aprobita kurso

Ni akceptis devigan kaj senpagan kurson de Esperanto laù permeso de la ministerio pri nacia edukado en la jaro 1986. Jen de lernantoj en liceo BOUBA kiu estas la unua en la lando.

Rabevazaha Désiré <desire_rabevazaha@yahoo.fr>



Jaro de la foto necerta.

# Krakovo daŭre aktivas, Pollando bobelas

En la Jagelona Universitato daŭras varbado al A1-A2-kurso. Tiaj kursoj (laŭ la skalo de la KER-ekzamenoj)ł kutime okazadis en la institucio, ĉeeste, sed la nova estos gvidata en Interreto. Baldaŭ mi anoncos ankaŭ, kiel ĉiujare, internaciajn enretajn kursojn, por esperantistoj de la tuta mondo. Esperanto estis la unua lingvo, instruata pere de Interreto, en la 656-jara Jagelona Universitato.



Maria Majerczak

# Partoprenu en la Belartaj Konkursoj 2021

La Belartaj Konkursoj de UEA naskiĝis en 1950. Ni havas statistikojn pri BK-partopreno ekde 1972. De tiam ĝis nun; la averaĝa nombro de konkursaĵoj estas 84. Pasintjare ni atingis 171, rekordan en la BK-historio. En 2019 partoprenintaj en BK estis 151 verkoj el Afriko, Azio, Eŭropo kaj Ameriko.

UEA enkondukon de nova branĉo, nomata **Kantoteksto**, kun la celo provizi Eo-kantistojn per bonaj kantotekstoj por iliaj repertuaroj. La unusola premio en ĉi branĉo

konsistos en muzikigo de la premiita teksto kaj prezento de la rezulta kanto fare de kantisto aŭ kantogrupo.




La rezultojn oni anoncos, ĉu ĉeeste, kadre de la 106-a Universala Kongreso de Esperanto en Belfasto (Nord-Irlando), se oni ĝin fine povos okazigi, ĉu iam, inter julio kaj septembro, kadre de virtuala BK-Festo samspeca kiel la ĉi-jara.

Kiel kutime, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Branĉoj estas poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj infanlibro.  La limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la **31-a de marto 2021**.

Detala regularo kaj informaro troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2021, legeblos en la volumo *Belarta rikolto 2021*, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: esperanto.net/literaturo/bk.

## Se Vi ne aŭdis pri Kotonuo…

En Kotonuo (Benino) abundas la aktivaĵoj ĉirkaŭ Esperanto:

15 - 21 novembro: plensemajna SEminario por VIrinoj kun 13 partoprenantinoj.
28-an de novembro: Tutmonda sesio de KER-ekzamenoj. Premiero en Afriko.
8 - 12 decembro: tritaga SEminario por VIrinoj kun 10 partoprenantinoj.

============= vortoj: 720 ============

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis 2020/33. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.